Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 25-an de januaro 2023 per Zoom

Ĉeestis
Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
Ni aprobis la tagordon.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 12-an de januaro 2023
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Esperantonia
Ni decidis raporti al la Landa Kunveno la alternativojn kiujn ni esploris kaj jam sendis al la Oslo-klubo, kun la aldona konkludo ke ni ne proponas forvendi Esperantonia-n.

4. Landa kunveno
Ni decidis okazigi la landan kunvenon virtuale la 1-an de junio de la 18-a ĝis la 21-a horo. Krom la kutimaj programeroj ni planas etan distraĵon.

5. Jarraporto 2022
Ni plulaboras pri la verkado de la jarraporto pri 2022, kiu prefere aperu en la unua numero de Norvega Esperantisto de 2023.

6. Telefono en Esperantonia
Malfacilos konservi la nunan, doman telefonon en Esperantonia. Anstataŭ ĝi ni aĉetu simplan, porteblan, oficejan telefonon. Bård kontaktos Herman pri tio.

7. Eventualaĵoj
a) kolekto de retpoŝtaj adresoj por la membroregistro. Ni aperigu en Norvega Esperantisto mesaĝon pri kolekto de retpoŝtaj adresoj de la membroj.
b) Vikipedia paĝo. Ni ĝisdatigu la paĝon de NEL en Vikipedio.

8. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 16-an de marto je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund